

Informoj pri stipendioj por la kursaro en Poznano

En septembro 2014 ekos nova trijara postdiploma kurso de interlingvistiko; ni jam raportis tion al vi per mesaĝo en la 26a de aprilo 2014.

Ĉu vi ŝategus partopreni la studojn en UAM, sed viaj enspezoj ne ebligas al vi ĉion pagi? Por la trijaraj interlingvistikaj studoj ekzistas ebloj ricevi financon subtenon en formo de stipendio. Ĝi kovras almenaŭ la ĉiusemestrajn universitatajn kotizojn. Stipendiojn disponigas Esperantic Studies Foundation (ESF), kun apogo de Universala Esperanto Asocio (UEA) kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI).

Por informoj pri la kursaro, rigardu la retejon:

<http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/interlingvistiko/index.html>.

Por informoj pri la stipendioj, rulu la ekranon suben ĝis la butono <Mi volas partopreni>. Klaku tion kaj anoncu vin. Sekve de tio, vi ricevos la stipendian petilon.

Starigita estas tri-persona mastruma teamo por fortigi la rilatojn inter ESF kaj UAM, kaj por prizorgi i.a. la administradon de la stipendioj. La deziro estas oferti por la studjaro 2014-2015 okon da stipendioj, kiuj kovros la studkotizojn, ĉu por A-landanoj, ĉu (precipe) por B-landanoj.

Kion vi devas plenumi

- **Prezantan leteron**, per kiu vi prezentas vin, viajn antaŭajn studojn, viajn ĝisnunajn agadojn rilate al Esperanto. Plie vi rakontu pri viaj celoj : por kio vi bezonas la studojn? Kion vi planas fari post la akiro de pliaj konoj?
- **Enketilon plenigitan**, kiun vi povas kontraŭ peto ricevi.

Limdato por sendi la petojn estas la 15a de julio 2014. La decidon ni komunikos mesaĝe al la petintoj ĝis la 10a de aŭgusto.

Kelkaj oftaj demandoj pri la stipendioj:

Kiel funkcias la stipendiado, se oni elektas min?

Vi ricevos kontrakton, kaj se vi plenumas la postulojn de la kontrakto, la mono estos ĝirata al vi fine de la semestro. Tio signifas, ke vi unue, komence de la semestro, devos mem pagi la kotizon, kaj ĝi poste estos repagata al vi.

Kiujn kondiĉojn enhavos la kontrakto?

La kontrakto postulas, ke la stipendiato regule plenumu la devigajn taskojn de la semestroj (do li/ŝi ĝustatempe plenumas la taskojn, esojn kaj ekzamenojn de la fakoj de la semestro), kaj ke li/ŝi laŭ personaj fortoj kaj spertoj helpas kontribuas al la disvolvigo de la studoj kaj ĉirkaŭaj aranĝoj. (vd. la sekvan demandon).

Kion mi devas fari interŝanĝe, kiam mi ricevas stipendion?

Oni atendas de la stipendiattoj, ke ili aktive partoprenu en la diversaj aktivecoj ĉirkaŭ la studoj. Tio povas esti helpo en varbado aŭ organizado, transpreno de filmado de la prelegoj, raportado pri la studoj, laboro por la hejmpaĝo de la studoj, kontribuoj al ARKONES (ARToj KONfrontoj kaj ESperanto, kulturfestivalo ligita al la septembra studperiodo) aŭ aliaj. Detalojn vi preparolos kun la komisiono tiam, kiam vi estos elektita. Viaj helppropozoj estos aldonitaj al la kontrakto.

Kio okazos, kaze ke mi ne povos finfari la studojn? Ĉu mi devos redoni monon?

Ni forte esperas, ke la personoj, kiuj ricevas stipendiojn, dumvoje ne ĉesos studi. Se tamen okazus tio (pro malsano k.s.), oni ne devos repagi ion, ĉar oni ricevos la monon nur por la jam plenumitaj semestroj.

Pliajn demandojn pri la kurso bv. sendi al la Universitato mem <interlin@amu.edu.pl> kaj demandojn pri la stipendioj al la Komisiono <as.esperanto@web.de>